AktivAmeriko

http://www.geocities.com/espameriko

UEA-Komisiono por Ameriko

Novaĵletero - **N-ro 9**, Decembro/2002

Librofoiroj en Kubo: daŭra agado

Kuba E-Asocio jam luis budon por partopreni la venontjaran Internacian Librofoiron de Havano, kiu komenciĝos la 30an de Januaro 2003. Fakte, la asocio partoprenis la librofoiron de la nuna jaro en Februaro, sed pro la alta kosto de partopreno, la estraro havis grandan dilemon financan por denove partopreni. Ĝuste pro tio ili provis kaj finfine trovis alian institucion por kundividi la budon, kio signifas duonigon de la kostoj. KEA dividos la spacon kun la provinca Centro de la Libro de Havano, kio donos al ĝi la eblecon ekspozicii E-librojn, informi kaj varbi interesitojn pri la lingvo.

Krome, tio permesas ke la Asocio ĉiam ĉeestu kulturajn kaj klerigajn eventojn kiel la Librofoiro, kie oni interrilatiĝas kun aliaj institucioj kaj miloj da homoj renkontas Esperanton. La estraro de KEA konsideras grava la partoprenon en tiaj eventoj, des pli grave ke oni sukcesis duonigi la partoprenkotizon.

laŭ informo de **Maritza Gutierrez**, *prezidantino*

Karaj legantoj,

Ĉiu renovigo estas pozitiva, eĉ se oni havas senton pri io perdita. Tio ĉi certe okazis rilate al la anonco, ke la unua Komisiito por Ameriko, Atilio ORELLANA ROJAS, decidis transdoni sian postenon! Post tiom da jaroj, li tamen plu restos tre proksima al la Komisiono por Ameriko, kiel teknika kaj financa konsilanto al la skipo. La nova Komisiito estas d-ro Adonis SALIBA, el Brazilo, multjara spertulo pri Esperanto en la reto. Aliaj landoj eniris la Komisionon kaj iuj reprezentantoj ŝanĝiĝis. La ŝanĝoj, aprobitaj de UEA-estraro, oficiale efektiviĝis dum la 87-a U.K. en Fortalezo *(legu raporton en paĝo 3)*.

Ĉinumere ne mankas entuziasmo en Venezuelo, amikemo en Kolombio, planado en Meksiko, organizemo en Kubo, laborpreteco en Brazilo, informemo en Dominika Respubliko ktp.

La Redaktanto

PS. Interŝanĝu laŭplaĉe la nomojn de tiuj landoj kaj aldonu aliajn amerikajn landojn: ne gravas, Esperanto pulsas tra la tuta kontinento! Feliĉan 2003 al ĉiuj!

Librofoiro en Sankta Domingo

Celoj plenumitaj

Juan Ramón Rodríguez Gómez (Kubo)

La Librofoiro *Sankta Domingo 2002* (25-a de aprilo-5-a de Majo) donis ŝancon al Kuba Esperanto-Asocio plenumi kelkajn celojn rilatajn al disvastigo kaj plifortigo de Esperanto en tiu lando, kaj speciale en la direkto informadi la ĝeneralan publikon pri la lingvo.

Dum 11 tagoj, la KEA-reprezentantoj Alberto Rodríguez Pineda kaj Juan R. Rodríguez Gómez havis la okazon ne nur ekspozicii librojn kaj gazetojn, sed ankaŭ vendi kelkajn el ili, disdoni centojn da propagandiloj, paroli kun tiuj kiuj demandis pri la afero (pli malpli po dek tage) ekde diversaj vidpunktoj, sperti ĝeneralan mankon de informoj en rilato kun Esperanto, kaj kontakti kun kelkaj kulturaj institucioj de la lando kaj de la regiono.

Inter la homoj kiuj vizitis nian standon ekzistis malsimilaj gradoj de konscio kaj kono pri la IL: tiuj kiuj konis nenion pri ĝia ekzisto ĝis aliaj misinformitaj aŭ duoninformitaj, eĉ tiuj simple pensintaj ke tiu ideo jam delonge mortis. Tio postulis de ni longajn kaj detalajn informojn kaj klarigojn; eĉ, kelkfoje, ekestis interesaj debatoj kaj dialogoj, kies ĉefa rezulto estis gajni interesitojn lerni E-on kaj trovi personojn pretajn apogi la poresperantan agadon en tiu lando.

Ene de tiu ĉi lasta grupo elstariĝas S-ro.Víctor Santos, posedanto de Librovendejo, kiu deziras lerni E-on kaj ekde nun bonvenigos tie interesitojn pri la IL kun la celo ke tiu kultura institucio estu lernejo kaj sidejo de E-o en Sankta Domingo. Mi liveris al li la adreson de tiuj kiuj montris intereson dum la Librofoiro, sed krome li jam propagandas la aferon kaj esperas malfermi kurson tie venont-septembre.

Cele al tio, oni donacis al li stokon da materialoj, i.a. tiuj de nia perkoresponda kurso surbaze de *Sabe Ud. Esperanto?* (teksto kaj kasedoj), krom alia baza materialo por vendi inter membroj de la grupo.

S-ro Santos veturigis min al Santiago de los Caballeros kaj tio donis al mi du aliajn ŝancojn: precizigi kelkajn detalojn en rilato kun E-o en Sankta Domingo, kaj kontaktigi lin persone kun Rafael Despradel instruisto de la loka grupo kaj grava helponto de la alia. Nia ĉefa interkonsento: havi oftajn kontakton pere de ĉiuj eblaj rimedoj.

En Santiago de Los Caballeros

La dua plej grava urbo de la lando permesis al mi ne nur renkontiĝi kun S-ro Despradel (la unua fojo okazis en Zagrebo, dum la UK), sed ankaŭ kun lia grupo, plejparte gejunuloj, kiuj entuziasme lernas E-on kaj kapablas uzi ĝin. Duhora dialogo kun ili estis la plej bona ekzemplo de tio.

Sendube, temas pri grupo kun sufiĉaj kapabloj por etendigi la aferon en Santiago de los Caballeros kaj en aliaj partoj de la lando aŭ eksterlanden. Inter ili lernas haitiano (Johano Paulo) kiu, post reiro, ege deziras kontribui kun la agado por E-o en sia lando. Espereble, li apogos la laboron de Christine Théano en

(daŭrigo en p. 3)

DULANDA EVENTO

I VENEZUELA-KOLOMBIA RENKONTIĜO

Inter la 8-a kaj la 10-a de Novembro 2002 disvolviĝis en Caracas, Venezuelo, la Unua Venezuela/Kolombia Esperanto-Renkontigho.

Kun la efektiva ĉeesto de trideko da aliĝintoj, ne regule akompanataj de pluraj ekstermovadaj interesitoj, precipe la unuan tagon, kiam la programo efektiviĝis nur en la hispana, nia Renkontiĝo plenumis kontentige siajn celojn: kadre de la Esperanto-agado analizi la dulandajn lokajn situaciojn, la malfacilaĵojn, la eblecojn, iniciatojn, atingojn, planojn.

La diversaj prelegoj montris la kontentigan lingvo-nivelon de la prelegintoj kaj indikis sekvindajn vojojn cele al la disvastigado de Esperanto kaj eblajn agadojn por atingi lernontojn por niaj kursoj. La densa programo ne lasis multe da spaco por distraj eroj, krom la gaja instrua prelego de la juna talenta bogotano Mauricio Cruz, kiu prezentis multajn ŝercajn ecojn de Esperanto-vortoj, la humuraĵoj de la kolombianoj Luis Jorge Santos kaj Luis Alfonso Casas, la interkona vespero en la sidejo de nia Asocio kaj la jubilea festo per kiu ni celebris la 90-jaran ekziston de la Venezuela Esperanto-Asocio. Ĉi-lasta utilis por plibonigi la reciprokan interkonon kaj forgesigi la laciĝon pro la laboroj kaj la streĉiĝon pro la bedaŭrindaj soci-politikaj cirkonstancoj kiujn travivantas nia Venezuelo de post kelke da tempo.

La prelegoj de Prof-ro Luis Jorge Santos, el Bogoto, estis modelo de majstra Esperanto-regado kaj de talenta oratorado, kaj prezentis multjarajn spertojn kadre de la lingvo-instruado, kun tre utilaj sugestoj.

Per valora prelego pri lingvistikaj aspektoj de Esperanto en speciala rilato kun nia hispana karakterizo, Prof-ro Esteban Mosonyi, el Caracas, evidentigis la ĝeneralan tendencon al erara prononcado, samtempe indikante eblajn rimedojn por minimumigi kaj eĉ tute forigi tiujn prononc-erarojn.

Tuta surprizo por la venezuelanoj rezultis Rikardo Carrillo, juna sed kapabla esperantisto el Bogoto. Per sia prelego pri "seksumado el okcidenta kaj orienta vidpunktoj", li pruvis ne nur konkretan regadon de la temo, sed ankaŭ kapablon ĝin prezenti per flua kaj bonega Esperanto.

La evento disvolviĝis en salonoj de la Pedagogia Instituto de Caracas, kies Direktoro respondis pozitive al la valoraj kaj akurataj alpashoj de ge-Prof-roj Negrete.

Ni havas la esperon ke nia laborkunveno rezultos fruktodona por sukcesa estonta agado kaj en Venezuelo kaj en Kolombio, kaj ke en ambaŭ landoj la kunlaboro kaj la oftaj kontaktoj estigos la taŭgajn kaj necesajn kondiĉojn por ke Esperanto akiru aŭskulteblan voĉon en nia regiono kaj antaŭ la tuta Esperantujo.

Andres Turrisi

Ĝenerala Sekretario de Venezuela E-Asocio

REZOLUCIOJ

La venezuelaj kaj kolombiaj esperantistoj kunvenintaj en la 1ª Venezuela-Kolombia Renkontiĝo de Esperanto kiu disvolviĝis en Karakaso (Venezuelo) de la 8a ĝis la 10-a de Novembro de la jaro 2002,

KONSTATINTE, ke la relativaj problemoj de la esperantistaro en la du landoj estas pli kvantaj ol kvalitaj;

KONSTATINTE, ke la lingvonivelo de la reprezentantoj de la ambaŭlandaj esperantistaroj estas kontentiga kaj sufiĉa por certigi sukcesan agadon cele al la instruado de la lingvo;

KONSTATINTE, ke la membroj de la Kolombia Esperanto-Ligo kaj de la Venezuela Esperanto-Asocio pretas kunlabori por la divastigo de la Internacia Lingvo en niaj najbaraj landoj;

DECIDAS interŝanĝi radioprogramojn, radiokursojn, artikolojn aperontajn en ĵurnaloj aŭ revuoj kaj aliajn materialojn kiuj povas faciligi la diskonigon kaj instruadon de Esperanto en niaj landoj;

DECIDAS kunlabori kun la Amerika Komisiono de UEA por antaŭenigi la trejnadon de latinamerikaj aktivuloj;

SUBSTREKAS sian pretecon agadi ene de la ILEI-Sekcio de Hispanparolantaj Landaj Asocioj por ebligi la trejnadon de Esperanto-instruistoj kaj instruantoj;

REKOMENDAS aserti, en la informado pri nia lingvo, ke "Esperanto estas la plej facila kaj regula lingvo" anstataŭ "Esperanto estas facila kaj regula lingvo";

EMFAZAS la konvenon kaj neceson intensigi la kontaktojn, konsultiĝojn kaj interŝanĝojn de spertoj utiligante la interreton;

REKOMENDAS, ke la kontaktoj inter la kolombiaj kaj venezuelaj esperantistoj vigliĝu kaj ke okazu regulaj vizitoj de niaj membroj al Esperanto-aranĝoj en ambaŭ landoj;

REKOMENDAS, ke ni klopodu inkluzivi en nian agadon kaj helpu la esperantistojn de ĉiuj hispanparolantaj landoj de Ameriko kaj de la karibaj insuloj en ilia por-esperanta laboro;

ATENTIGAS, ke en Aprilo de 2004 okazos la 6ª Tutamerika Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo;

REKOMENDAS, ke kiel eble plej multaj Esperanto-aktivuloj el Venezuelo kaj Kolombio partoprenu en tiu grava aranĝo.

KROMAJ VOJOJ POR AMERIKA AGADO

Kiel preleganto de la oktobra kulturkunveno de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, la nova UEA-Komisiito por Amerika Agado, d-ro Adonis SALIBA, parolis pri la graveco faciligi la interŝanĝon de spertoj inter la esperantistaj aktivuloj en amerikaj landoj, per projektoj koncernantaj ne nur la lokajn esperantajn eventojn, sed ankaŭ la kulturan kalendaron de la koncernataj esperantaj interagantoj.

La preleganto memorigis ke la urbo San-Paulo mem de multaj jaroj malfermas la pordojn de sia interkulturejo Memorialo de Latinameriko al ĉiaj kulturaj manifestiĝoj de la najbaraj landoj. Kial ne ankaŭ la e-istoj uzu tiajn "oficialajn vojojn" por interŝanĝi siajn kulturaĵojn pere de Esperanto? demandis entuziasmoplene la amerika Komisiito.

6-a TUTAMERIKA KGR. DE ESPERANTO

UNUA BULTENO

Bonvenon al Havano 2004!

Havano fariĝos denove ĉefurbo de Esperanto okaze de la 6a Tutamerika Kongreso, kiu sesios en Kubo de la 21a ĝis la 27a de marto 2004. Pluraj aspektoj pravigas la elekton de Kubo por gastigi la 6an TAKE, inter ili la prestiĝo de Kuba Esperanto-Asocio kaj la sperto akirita dum 23-jara ekzisto, dum kiu ĝi sukcesis okazigi diverstipajn internaciajn aranĝojn, kies kulmino estis la 75ª Universala Kongreso en 1990. Krome, la jaro 2004 markas la centjariĝon de Esperanto en nia insulo.

Por tiu speciala okazo Kuba Esperanto-Asocio sin preparas kaj pretas akcepti kongresanojn el nia regiono kaj ankaŭ el aliaj mondpartoj, kiuj certe estos tre bonvenaj kaj kontribuos, post la kongreso en Fortalezo, al la plifortigo de la E-agado en Ameriko.

Sub la temo "Kia Esperanto-movado por Ameriko?", la kongresanoj ĝuos tutan semajnon de varia programo kun prelegoj, kunsidoj pri la amerika agado, rondaj tabloj, kulturaj vesperoj, ekskursoj kaj aliaj interesaj programeroj.

La Loka Preparkomitato de la 6a TAKE invitas vin veni al Kubo kaj esperantumi en nia kariba insulo, kie Esperanto estas solida kaj matura kaj kompreneble oni organizos antaŭ- kaj postkongresojn por ebligi al ĉiuj partoprenontoj pli longan restadon en nia lando kun la ĉiama gastamo de la kuba esperantistaro.

Kiel TAKE-premiero, ni organizos la Unuan Tutamerikan Infanan Kongreseton, kio ebligos al la certe multaj infanoj en la regiono konatiĝi kaj kunrestadi, dum la pliaĝaj klopodas trovi rimedojn por ampleksigi la agadon.

Tiu ĉi kongreso estas parto de pli granda plano de UEA por plifortigi la komunan laboron en la kontinento kaj la rilatojn inter la amerikaj Landaj Asocioj.

En tiu kunteksto, ni planas organizi la 1an Tutamerikan Kulturan Festivalon (Santiago de Cuba, 2005), kaj la 2an Iberamerikan Konferencon "Esperanto '06" - la unua ankaŭ okazis en la kuba ĉefurbo en 1988 -, ĉifoje kun emfazo en la temoj esperantologio kaj interlingvistiko.

Kia Esperanto-movado por Ameriko?

Ĉu la problemoj kiujn alfrontas la Landaj Asocioj en Ameriko estas la samaj kiel en Eŭropo? Ĉu la meza esperantisto estas la sama? Ĉu ili alvenas al nia movado pro la samaj interesoj? Kiel plialtigi la membraron? Kiamaniere helpi la movadon en landoj kun burĝonaj asocioj? Kion alportas la kulturoj de niaj landoj al nia komuna trezorujo? Jen kelkaj el la demandoj, kiuj provos trovi respondojn dum la Kongreso, pere de prelegoj, rondtablaj diskutoj, koridoraj aŭ ĉekafaj babiladoj, ktp. Ni ĉiuj profitos el viaj ideoj kaj sugestoj!

Aliĝkotizoj

Ĝis dec.2003 USD 40.00 (poste: USD 60.00)

Akompanantoj de kongresanoj, kaj gejunuloj ĝis 16 jaroj, pagos 50% de la aliĝkotizo. Infanoj ĝis 11 jaroj kaj handikapuloj ne pagos aliĝkotizon.

Loka Preparkomitato de la 6a TAKE

KUBA ESPERANTO-ASOCIO
Poŝtfako 5120
CU-10500 Havano Kubo
Telefonoj: +53(7)40 4484 kaj 53 9102
Fakso: 33 8729 Rete: **kubesp@ip.etecsa.cu**

PUBLIKA KUNSIDO DE AMERIKO DUM LA 87-A UNIVERSALA KONGRESO

Fortaleza, Brazilo (8-an/Aŭg./2002)

La publika kunsido de Amerika Agado disvolviĝis laŭ tre harmonia etoso kaj multaj havis la vicon paroli. Edvige Tantin Ackermann (Italio) rakontis pri sia unumonata vojaĝo tra Brazilo. Atilio Orellana Rojas publike dankis al James Rezende Piton pro multjara laboro en la UEA-Komisiono por Ameriko. Li transdonis la reprezentantecon de tiu Komisiono en Brazilo al Maurício Signorini Prado de Almeida. Ankaŭ Michela Lipari (Estrarano de UEA pri Landa Agado) parolis.

Poste Atilio anoncis sian anstataŭanton kiel nova UEA-komisiito por Ameriko: Adonis Saliba. Li rakontis pri la famaj diskutlistoj kiujn li antaŭ jaroj fondis (ambaŭ estas aŭspiciitaj de Brazila Esperanto-Ligo): Virtuala E-Klubo Internacia-VEKI *http://www.esperanto.org.br/veki* kaj EKI (komencantoj el portugallingvaj landoj).

Atilio ankaŭ raportis pri la starigo, en majo de tiu ĉi kuranta jaro, de la Amerika Oficejo en ĉambro de Brazila E-Ligo, en Brasília. La deĵoranto, Francisco Mattos de Oliveira, donis specifajn informojn pri la oficejo.

Krom Atilio, kiu raportis pri Honduraso kaj Dominika Respubliko, multaj rakontis pri la movado en siaj landoj: Christine Théano (Haitio); Deolinda Vera López, kiu anoncis la intencon fondi Paragvajan Esperanto-Asocion; Eddy Silva Molina (Nikaragvo), kiu petis al ĉiuj sendi bildkartoj al tiu lando; Aurora Garcia, pri Meksiko; Esteban Mosonyi (Venezuelo) pri la dulanda evento; Maritza Gutiérrez rakontis pri Kubo, kiu organizos la 6-an Tutamerikan Kongreson de Esperanto (TAKE). Menciinda la frateca etoso inter usonanoj kaj kubanoj kaj la aplaŭdo pro la anonco pri la internacia geedziĝo de Joel Brozovsky (Usono) kaj Leonora Gonzalez (Meksiko), kiuj konatiĝis dum la 5-a TAKE, okazinta pasintjare en Meksikurbo.

Fine, Leonora Torres (Meksiko) publike dankis al Atilio pro la laboro antaŭ la Komisiono dum tiom da jaroj. Nun li helpos aliajn kontinentajn Komisionojn de UEA kaj plu estos konsilanto en la Amerika.

laŭ raporto de Maurício Signorini P. Almeida

(daŭrigo el la unua paĝo)

deziras kontribui kun la agado por E-o en sia lando. Espereble, li apogos la laboron de Christine Theane en Portoprinco kaj aliaj lokoj.

Por tiu grupo, mi portis donacon de Kuba Esperanto-Asocio, konsistanta je libroj, gazetoj, kasedoj kaj aliaj esperantaĵoj. Mi ankaŭ liveris al S-ro Despradel kelkajn materialojn vendotajn al la gelernantoj Estis la unua fojo ke alilandaj esperantistoj vizitis Dominikan Respublikon kun la celo labori por Esperanto, kaj unuafoje ankaŭ, ke membroj de KEA vojaĝis eksterlanden kiel parto de oficiala delegacio, kio signifas rekonon al nia enlanda laboro kaj plifortiĝon de publikaj rilatoj niaj kun la aliaj 17 kubaj kulturklerigaj institucioj kiuj membris tiun oficialan reprezenton. Do, rezultoj estis ambaŭflanke. Konklude, Esperanto gajnis.

En land' En land' En land' En land' En land' En

Argentino

La nova UEA-Ĉefdelegito por Argentino estas ankaŭ la nova reprezentanto de tiu lando en nia Amerika Komisiono, Rubén Sánchez, el urbo Neuquén. La rolon de Ĉefdelegito dum multaj jaroj sindediĉe plenumis Rodolfo Calógero.

Argentina E-Ligo bezonas komputilon por la eldonado de sia oficiala organo, *Argentina E-Vento*. Tiuj, kiuj iel povas kontribui al tiu celo estas petataj kontakti la Komisiiton Adonis Saliba aŭ Konsilanton Atilio Orellana.

Brazilo

Kreskanta intereso jaron post jaro estiĝas inter brazilaj esperantistoj pri la Mondaj Sociaj Forumoj (MSF) en sudbrazila Porto Alegre. Por la MSF 2003, al lokaj esperantistoj kunordigataj de Miguel BOEIRA VIANNA miguel@esperanto.zzn.com aldoniĝos kunlaborpretaj aktivuloj el diversaj brazilaj urboj, kiuj vojaĝos centojn kaj eĉ milojn da kilometroj por tie informi, ke alia mondo eblas, ankaŭ sur (kaj per) la lingva kampo. Estas probable, ke ankaŭ nia ĉilia Komisionano, d-ro José VERGARA, partoprenos tiun informan agadon.

Profesia E-lernejo LINGVA (el urbo São Paulo) iniciatis la unuan jarfinan renkontiĝon por E-familioj kaj unuopuloj en Brazilo. Rigardu detalojn ĉe http://www.geocities.com/lingvajarfino - La evento okazos dum kvin tagoj (de la 28-a/Dec/2002 ĝis la 02-a/Jan/2003) en kolonia urbeto São Luís do Paraitinga-SP.

De la 12-a ĝis la 16-a de Julio 2003 en la kongresejo RioCentro okazos Internacia Kongreso pri Odontologio, kun 20 mil dentistoj kaj entute 40 mil partoprenontoj. Plian fojon Aldenora Mendonça Mercês aldenoraesperanto@bol.com.br, el urbo Nova Iguaçu, sukcesis permeson informadi pri Esperanto kaj eĉ vendi lernomaterialon en aparta budo. Tiufakaj profesiuloj, kiuj scipovas aŭ interesiĝas pri Esperanto estas petataj rekte partopreni tiun agadon. Bv. skribi al Aldenora aŭ telefoni al ŝi: +55 (21) 2695 3536.

Meksiko

Meksika E-Federacio http://www.esperantomex.mx.org planas plurajn eldonaĵojn por la jaro 2003. Inter ili estas serio *"Documentos de Esperanto"*. La unua numero jam estas tradukita kaj temas pri "Internacia lingvo kaj homaj rajtoj", verkita de professoro Roberto Phillipson, kaj eldonita de UEA en ĝia serio "Esperanto-Dokumentoj" (N-ro3E). Nun MEF atendas respondon al sia propono, ke UEA eldonu hispanlingvan serion. La dua numero estos "Esperanto je la horo de tutmondiĝo", super kiu nuntempe laboras Jorge Luis Gutiérrez. Duan numeron de "Flor' kaj kanto", enhavanta kvin novelojn de nuntempaj verkisto Juan Rulfo, Martín Luis Guzmán, José Revueltas kaj Jorge Ibargüengoitia. Tiu volumo estas prezentota dum la Sepa Meksika Kongreso, en Cuernavaca, Majo 2003.

Kompakta disko kun 12 kanzonoj de "Cri-Cri", plumnomo de Francico Gabilor Soler, muzikisto kiu dediĉis sian talenton komponi infanajn kantojn, estas alia projekto de meksikaj esperantistoj. La traduko estas preta, farita de Vicente Valdés. Li ankaŭ kunordigos la interpretadon (pere de infana ĥoro) kaj surdiskigon. Se ĉio iros glate, post kelkaj detaloj pri kopirajto, la disko estos prezentata dum la kongreso.

Prof-ro Ruben Feldman Gonzalez komencis en Decembro 2002 kurson de Esperanto ĉe la Universidad Autonoma de Baja California en Mexicali-Meksiko. La grupo 332 de la Fakultato de Eksteraj Rilatoj organizis la kurson, kiu konsistas el 18 gelernantoj, ĉiuj pli junaj ol 24 (11 el la gelernantoj estas junulinoj 20-jaraj). Allogo ĉefe venis de la anonco : "Kontraŭ lingva imperiismo kaj por Lingvaj Homaj Rajtoj". Prof-rino Gricelda Lozano klopodos por enkonduki la Kurson ADE ene de tiu Fakultato.

AktivAmeriko

novaĵletero de UEA-Komisiono por Ameriko
aperas dufoje en la jaro (Junio kaj Decembro)

Redaktanto
James Rezende Piton
✉ Caixa Postal 1097
Campinas (SP), BR-13001-970, Brazilo
☎ kaj 🖷 +55 (19) 3256 0268
james.piton@iname.com

UEA-Komisiito por Ameriko
d-ro Adonis Marcelo SALIBA SILVA
✉ R. Corinto, 543 – apt. 81
São Paulo (SP), BR-05586-060, Brazilo
☎ kaj 🖷 +55 (11) 3725 1206
adonis@astrale.com

UEA-KOMISIONO POR AMERIKO

UEA-estrarano (Landa Agado)
Michela LIPARI (Romo, IT)
Kunordiganto de kontinentaj komisionoj
Atilio ORELLANA ROJAS (Den Haag, NL)

Argentino
Rubén SÁNCHEZ (Neuquén)
Brazilo
Maurício SIGNORINI P. de ALMEIDA
(São José do Rio Preto)
Ĉilio
José Antonio VERGARA (Puerto Montt)
Dominika Respubliko
Rafael DESPRADEL (Santiago)
Honduraso
Elmer ESCOTO (San Pedro Sula)
Kanado
Richard PIPER (Québec)
Kolombio
Ricardo CARRILLO CALDERÓN (Bogotá)
Kostariko
Hugo MORA POLTRONIERI (San José)
Kubo
Juan Ramón RODRÍGUEZ (La Habana)
Meksiko
Leandro GARCIA (Oaxaca)
Usono
Natalie SERA (Reno)
Venezuelo
Juan Eduardo BACHRICH (Caracas)